nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2019

## REZULTO DE LA ĜENERALA KUNSIDO DE MEL

Kiel kunvokite en lasta bulteno, Madrida Esperanto-Liceo okazigis ĝeneralan kunsidon, la 3an junio 2019, en la sidejo de la asocio, por pritrakti la decidon prenendan de MEL pri ĝia voĉdono por elekti kvin komitatanojn B de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), al kiu MEL apartenas. Voĉdonis naŭ membroj, enkalkulante tiujn reprezentitajn de alia ano. Protokolon oni disponigos al la anoj.

Post la voĉdono kaj elekto de kvin kandidatoj, la sekretario voĉdonis rete nome de MEL laŭ la reguloj de UEA.




## RENKONTIĜOJ EN PARKO RETIRO

Por la unuasabata renkontiĝo en julio, ni denove rendevuos en Parko de Retiro. Tio okazos je la 6a de julio, je la 6a horo, denove apud la statuo de Ricardo Codorniu, tre proksime al la Vitra Palaco (Palacio de Cristal).

Vidu apude foton de la pasinta rendevuo, komence de junio.

## PLIA POEZIA ELKATAKOMBIGO

La pasintan 8an de junio, en "La Cacharrería", la plej fama salono de la Madrida Ateneo, oni prezentis la elstaran hispanlingvan poemaron *Aire verdadero* [Vera aero], de la madrida poeto, filologo kaj parolisto ĉe Radio Utopía Armando Silles McLaney, kultur-homo tre favora al Esperanto. La enkondukon faris nia amiko la E-poeto Miguel Fernández, kiu, krome, petite de Silles mem kaj de kelkaj ĉeestantoj, deklamis sian esperantigon de unu el la poemoj en la poemaro, kio estis entuziasme akceptita de la publiko. La organizantino de la aranĝo, Victoria Caro Bernal, konata poetino, aktorino kaj responsulino pri literaturaj babilrondoj en Ateneo, publike sin deklaris impresita de la beleco de nia lingvo kaj preta fari, ke la Madrida Ateneo institucie apogu la ĉeeston de Esperanto kaj de la E-poezio kadre de siaj kulturaj aranĝoj. Ni do studas kiel repreni la iamajn agadojn en tiu kulturinstitucio.



## SPEKTAKLO PRETIGATA EN MATADERO

Pretiĝas nun grava spektaklo, kiun oni montros fine de novembro en la kulturcentro Matadero (Legazpi), en kiu Esperanto ĝuos gravan rolon, jam de la titolo.

Ĝin kreis prestiĝa artisto Blanca Gracia (interalie jam dufoje ekspoziciinta en artfoiro Arco), kaj temas pri baleta-muzika-bilda-drama spektaklo, kies titolo estas "Rompu, rompu!" (jes, tiel, en Esperanto kaj kun jena, same esperante formulita klarigo: "rompu, rompu la murojn inter la popoloj!").




Esperanto aperas en la tria akto. Blanca petis nin esperantigi ties tekston kaj instrui la aktorojn prononci la esperantajn vortojn en ĝi. Miguel Fernández tuj surprenis la tradukan taskon kaj Alejandro Pareja proponis sin kiel prononc-instruiston antaŭ ol Miguel mem kontrolos la finan intonacion de la aktoroj. La verko premieros en novembro, sed la pasintan 29an de junio okazis publika provludo de la unua sceno de "Rompu, rompu!" , pri la mito de Eĥo kaj Narciso, kiun ĉeestis niaj samideanoj Ana Manero, Manolo Parra kaj Miguel Fernández. Ili deklaris sin ravitaj de la prezentado, vere altnivela kaj belega, kaj de la persona konatiĝo kun la aŭtorino, ĉarma, dankema kaj plena de entuziasmo al nia afero kaj al arto.

Baldaŭ alvenos la provludo de la tria sceno de la verko, kie Esperanto ludos apoteoze en la formo de parolado, hispanlingve aperonta surekrane, kaj kiel ĉefa ero de festo de la interkomunikado, kun ĉiuj geaktoroj sur la scenejo, kun esperantaj bildoj kaj kantoj, kun plurkoloraj lumoj kaj standardoj. Ni provos informi per la kutimaj publikaj kanaloj, kaj ĉiukaze ni detalos al vi kaj la datojn kaj la horaron kaj la ĝustan ejon, kie venontnovembre okazos kaj la premiero kaj postaj prezentadoj de la spektaklo "Rompu, rompu!".

Pliaj detaloj (hispanlingve): http://www.mataderomadrid.org/ficha/9909/en-residencia:-blanca-gracia.html kaj http://www.blancagracia.com.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Dum la monato julio oni planas malfermi la sidejon dum la lundaj vesperoj, kiel kutime, sed atentu ke ni ne povas garantii tion, kaj do estas prudente kontakti antaŭe por konfirmi. En aŭgusto la sidejo estos plejparte fermita. La unuasabata renkontiĝo okazos la 6an de julio, kiel antaŭe menciite, sed plej probable en aŭgusto ĝi ne okazos. Atentu tamen la kutimajn forumojn kaze ke oni organizu renkontiĝojn okaze de vizitoj de esperantistoj al Madrido.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo
Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid
Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo
http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es
Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com